



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 251

Marto, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — Kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter

71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

## ĈU ESPERANTO, SAME KIEL NACIA LINGVO, MINACUS ALIAJN LINGVOJN?

Legante la pensojn pri Esperantismo kaj multlingvismo en *Inter Ni* 245, 2006 septembro, de Francisko Lorrain („Post la fina venko, kio?”), mi ankoraŭfoje miras ke sperta esperantisto evidente ne havas, aŭ ne rimarkis, spertojn similajn al la miaj. Mi diras „ankoraŭfoje”, ĉar ĝuste en tiu sama monato, septembro, tiu temo aperis en Norek<sup>1</sup> en Seatlo. Tie tre sperta esperantisto esprimis similan penson, ke se ĝi iĝus efektiva tutmonda dua lingvo, Esperanto same minacus etajn lingvojn kiel nacia lingvo en tiu pozicio (kaj ke necesas por la esperanto-movado tion pripensi kaj plani por tio).

Miaj spertoj kaj observoj tamen igas min konkludi malsame. Mi komparas ĉefe kun la angla lingvo, ĉar tiun nacian lingvon mi plej bone konas, kaj ĉar ĝi estas nuntempe en la mondo la plej „minaca” el hegemonia vidpunkto. Tamen, mi supozas ke ne multe diferencus se temus pri franca, rusa, hispana, hindua, ĉina, aŭ alia granda nacia lingvo.

Mia patro parolis nur la ĉeĥan lingvon ĝis kiam, sesjara, li ekiris al lernejo, kie li devis lerni kaj uzi anglan. Tiam, lia familio decidis ŝanĝi al la angla lingvo en la hejmo, do li praktike ne plu uzis sian denaskan lingvon, kaj preskaŭ plene forgesis ĝin. Kiam 65-jara, li ekklopodis relerni la ĉeĥan, sed baldaŭ ĉesis, malinstigita pro la malfacilo kaj la preskaŭ plena forgeso. Jen efektiva ekzemplo de la angla lingvo plene forpuŝanta alian lingvon. Tiaj ekzemploj abundegas en la historio de Usono.

Kial, do, lia familio decidis forlasi sian propran lingvon? Certe ne pro malŝato pri ĝi, nek pro manko de utilo (ili ja loĝis en ĉeĥa vilaĝo en la usona ŝtato Nebraska).

Laŭ mia patro, la kialo estis por helpi lin kaj liajn fratinojn lerni paroli anglan kiel denaskuloj; tio estas, por eviti la diskriminacion kiun ricevas homoj kies parolmaniero ŝajnas „fremda”.

En alia Norek en la ŝtato Montano en 1987, mi renkontis 60-jaran esperantiston kiu (mi ne memoras la kialon) paroladis dum du horoj en la angla lingvo. Lia parolo de angla lingvo estis bela kaj erudicia — la unua kialo suspekti ke li ne estas denaska parolanto estis tio, ke li parolis angle tro perfekte gramatike kaj prononce. Nu, profesoroj povas fari tion, do tio ne pruvas ke li ne estas denaska parolanto. Efektive, li ja estis profesoro. Tamen, proksimume unu fojon en ĉiu horuono, li draste misuzis usonan idiotismon. Tia fuŝo venanta el inter tiom da belega perfekta angla lingvo treege frapis. Montriĝas, ke li naskiĝis en Portugalio kaj enmigris al Usono 20-jara, pere de esperantistoj. Li penadis dum sia tuta plenkreska vivo perfektigi sian regon de la usonangla lingvo, kun admirinda rezulto. Sed, finfine, pro la idiotismoj, fiaskis lia klopodo kaŝi sian fremdecon.

Tiu renkonto tre pensigis min pri la angla lingvo, kaj kiom malfacila ĝi estas. Se tiu tre inteligenta kaj diligenta sinjoro ne povis sukcesi majstri la anglan lingvon en 40 jaroj da penado, al mi ŝajnas ke la tasko estas vere malebla por plenkreskulo.

Jen al kio mi celas: por lerni la anglan lingvon sufiĉe bone por bonprofite uzi ĝin inter denaskuloj (sen diskriminacio), necesas dediĉi sian tutan lingvan vivon al ĝi, forĵetante laŭeble siajn antaŭajn lingvojn. Tiel angla lingvo forpuŝas aliajn lingvojn. Ĉar angla lingvo ja apartenas al iuj nacioj kies anoj sentas sin rajtigitaj posedantoj de la „ĝusta” parolmaniero (eĉ se oni permesas kelkajn „ĝustajn” por alilandaj denaskuloj), tiuj kiuj lernas ĝin ne denaske sentas bezonon laŭeble imiti la kuriozan parolmanieron de denaskuloj, sed efektive fari tion estas treege malfacile kaj postulas plenan vivon da klopodoj.

Esperanto, aliflanke, nek postulas tiom da peno por plene majstriĝi, nek havas denaskularon kies kuriozan parolmanieron necesas imiti. Simple dirite, *ne necesas dediĉi sian tutan vivon al esperanto por ĝin majstri*. Ne nur eblas majstri esperanton kaj alian lingvon samtempe, sed laŭ mia scio, senescepte ĉiu esperantoparolanto regas ankaŭ alian lingvon. Se temas pri grandaj grupoj da homoj en kiuj mi iam ajn troviĝis, la plej unulingva konsistas el usonanoj, kun japanoj en la dua loko. Kontraŭe, la plej multlingvan grupon konsistigas esperanto-parolantoj.

Laŭ miaj propraj sperto kaj observo de multaj amikoj kaj konatoj, lerno kaj uzo de esperanto igas homojn lerni pliajn lingvojn. Pro esperanto mi lernis paroli du pliajn lingvojn, kaj lernis iom kompreni dekon da lingvoj. Antaŭ ol renkonti esperanton,

---

<sup>1</sup> NOREK: Nord-Oksidenta Regiona Esperanto-Konferenco, okazanta kutime en aŭtuno pli-malpli alterne en nord-okcidenta Usono kaj sud-okcidenta Kanado.

mi estis firme konvinkita ke mi ne kapablas lerni aliajn lingvojn.<sup>2</sup> Mi konas multajn homojn kun similaj spertoj. En la praktiko, do, esperanto ja efektive subtenas multlingvismon, dum la angla faras la malon.

Mi opinias, ke rilate la temon de esperanto kaj multlingvismo, la plej gravaj farendaĵoj por la esperantomovado estas la jenaj: 1. Publikigi tiajn spertojn kaj observojn. 2. Sisteme fari tiajn observojn kaj science kolekti studojn kaj statistikojn pri ili, por povi pli bone montri al la mondo la veron pri esperanto.

— Joel Brozovsky

<sup>2</sup> Kelkaj kialoj, laŭ mia observo, ke esperanto igas homojn lerni pliajn lingvojn:

1. Pro sia relativa facileco, esperanto kuraĝigas homojn fidi ke ili kapablas lerni aliajn lingvojn. [Certe vera por mi!]

2. Pro internaciaj spertoj uzi esperanton, amikiĝi internacie, ktp, oni pli renkontas aliajn lingvojn kaj ties parolantojn, do pli interesiĝas pri ili. [Ankaŭ vera por mi.]

3. Pro la sperto aparteni al komunumo kies lingvo estas ofte malrespektata, oni pli bone komprenas la malbonon de diskriminacio lingva, kaj eventuale pli emas defendi etnajn lingvojn kaj lingvaj rajtojn. [Sen esperanto, mi eĉ ne komprenus kion signifas „endanĝerigita lingvo“.]

En venonta numero Francisko Lorrain respondos.

There's a certain slant of light,  
On winter afternoons,  
That oppresses, like the weight  
Of cathedral tunes.

Oblikvas iel lum' de tag',  
En vintra posttagmez',  
Kiel la preĝejorgen'  
Premante per vibranta pez'.

Vintre, posttagmeze  
Frapas luma fal',  
Prem-opresas peze  
Kiel ĉant' en katedral'.

Heavenly hurt it gives us;  
We can find no scar,  
But internal difference  
Where the meanings are.

Ĉielan doloron donas ĝi;  
Sed sen cikatra spur',  
Ŝanĝiĝas iel en intern'  
Ie en signifmemor'.

Nin Ĉielo tuŝas;  
Dolor' sen ia spur,  
La signifo kuŝas  
Profunde en la kor'.

None may teach it anything,  
'Tis the seal, despair, —  
An imperial affliction  
Sent us of the air.

Instrui ĝin — nur vana pen',  
Sigel' de malesper', —  
Afliktaj' de imperi'  
Sendita kvazaŭ el aer'.

Mi estas senpova,  
Sigelita: „Malesper'” —  
El nenio venas nova  
Pasiono de mizer'.

When it comes, the landscape  
listens,  
Shadows hold their breath;  
When it goes, 'tis like the  
distance  
On the look of death.

Pejzaĝ' aŭskultas, je alven',  
Al ombroj mankas spir',  
Similas al la granddistanc'  
Ĉe mortaspekto, je forir'.

Falas lum', pejzaĝ' silentas,  
Eĉ la ombroj spiras ne;  
Mallumiĝas kaj mi sentas  
Ke la Mort' rigardas re.

— verkis Emily Dickinson\*

— tradukis Steĉjo

— tradukis Liĉjo Miller

Represita de *Naska Fasko*

\* El *The Collected Poems of Emily Dickinson*, Barns & Nobel, New York, 1993. Tiuj kiuj ne bone regas la anglan sciuj, ke ofte estas malfacile kompreni la precizan signifon de la esprimoj de tiu ĉi fama poeto.

Magiaj Kvadratoj — dua parto

Estas konataj multaj metodoj por krei magiajn kvadratojn. Tre gravas, ĉu  $n$  estas para (dividebla per du) aŭ nepara.

Ni prezentas kelkajn ekzemplojn: Se  $n = 5$  (nepara nombro), ni kreas rombon kun 25 ĉeloj, kiel en Figuro 1:

				5				
			4		10			
		3		9		15		
	2		8		14		20	
1		7		13		19		25
	6		12		18		24	
		11		17		23		
			16		22			
				21				

Figuro 1

Ni desegnas kvadraton  $5 \times 5$ . Rimarku, ke la meza nombro (ĉi tie 13) estas en la mezo de granda ikso (la dikaj nombroj). Tiuj estas la diagonaloj de la nova kvadrato (Figuro 2). Vidu la ruĝajn nombrojn kiuj ĉirkaŭas la mezan nombron en Figuro 1 — ni metu ilin en la mezojn de la respektivaj randoj de la magia kvadrato en Figuron 2.

3		9		15
	8		14	
7		13		19
	12		18	
11		17		23

Figuro 2

Nun rimarku la restantajn nombrojn triopajn (ili estas verdaj). Oni interŝanĝas la supran kaj la malsupran triopojn. Oni ankaŭ interŝanĝas la dekstran kaj la maldekstran triopojn. (Pro formo la triopoj sidiĝas perfekte.) Kaj jen magia kvadrato de ordo 5 (Figuro 3):

Similaj reguloj aplikas al la kreo de aliaj neparaj magiaj kvadratoj.

1	2	3	4
5	6	7	8
9	10	11	12
13	14	15	16

Figuro 4

Nun ni montros unu el pluraj metodoj por krei magian kvadraton de ordo 4. Unue ni skribas la 16 nombrojn laŭvice (Figuro 4). Ni lasas senŝanĝe la nombrojn en la du diagonaloj (montritaj nigre). Sekve, ni subtrahas ĉiun el la ceteraj nombro (ruĝaj) de 17. Kaj ni havas belan magian kvadraton de ordo 4 (Figuro 5).

3	16	9	22	15
20	8	21	14	2
7	25	13	1	19
24	12	5	18	6
11	4	17	10	23

Figuro 3

1	15	14	4
12	6	7	9
8	10	11	5
13	3	2	16

Figuro 5

Estas pli malfacile krei magian kvadraton el la ordo 6 ol tiun el la ordo 4. Oni unue skribas la aritmetikan serion laŭ normala sinsekvo, de 1 ĝis 36 (vidu Figuron 6).

1	2	3	4	5	6
7	8	9	10	11	12
13	14	15	16	17	18
19	20	21	22	23	24
25	26	27	28	29	30
31	32	33	34	35	36

Figuro 6

Due, oni inversigas la ordon de la nombroj en ĉiu diagonalo (vidu Figuron 7):

36	2	3	4	5	31
7	29	9	10	26	12
13	14	22	21	17	18
19	20	16	15	23	24
25	11	27	28	8	30
6	32	33	34	35	1

Figuro 7

Trie, oni interŝanĝas la sekvajn nombro-parojn: 2 kaj 32, 7 kaj 12, 10 kaj 28, 20 kaj 23, 18 kaj 24, kaj 33 kaj 34. (Estas, fakte, kurioza simetrio en ĉi tiuj interŝanĝoj.) Oni montras la nombrojn interŝanĝendajn ruĝe en Figuro 7. Vi povas vidi la finan rezulton en Figuro 8.

La nombro da eblaj magiaj kvadratoj estas neimageble granda, eĉ se temas nur pri magiaj kvadratoj de ordoj 4, 5 kaj 6. Kaj matematikistoj jam trovis multajn metodojn por krei ilin. Oni kalkulis, ke el la unuaj 16 nombroj oni povas konstrui 880 fundamentajn magiajn kvadratojn, el kiuj oni povus prezenti ĉiun en 8 versioj per turno kaj reflekto.

Estas magiaj kvadratoj kiuj havas aliajn, specialajn proprecojn, ekzemple:

- kies partoj estas ankaŭ magiaj kvadratoj;
- kies nombroj ne sekvas laŭvice;
- kiuj havas pli ol unu kadron, ktp.

36	32	3	4	5	31
12	29	9	28	26	7
13	14	22	21	17	24
19	23	16	15	20	18
25	11	27	10	8	30
6	2	34	33	35	1

Figuro 8

En la jarcentoj 16a kaj 17a la magiaj kvadratoj estis tiel disvastigitaj kiel en nia tempo estas la krucvortenigmoj. Fame konataj estis la magiaj kvadratoj de Benjamin Franklin (1706-1790), kiu estis usona verkisto, ŝtatisto kaj scienculo.

Pri la farado de diversaj magiaj kvadratoj kaj pri iliaj proprecoj ekzistas multaj libroj kaj ankaŭ multaj informoj en la „interreto”.

— Suzanna Barabás,  
Oradea, Rumanio

[Se iu deziras pluajn informojn pri magiaj kvadratoj, nur skribu al ni. Eble ni ne povos respondi al ĉiuj demandoj, sed ni ĝoje diskutos. — la redaktoro]